

# Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2020

Jarkolekto 7 - Numero 2



*Medalego kun plaketo en la kataluna urbo Sabadelo*

# ENHAVOTABELO

de aprilo 2020

Titolpaĝo: <i>Medalego kun plaketo en la kataluna urbo Sabadelo</i> .....	1
Enhavotabelo .....	2
De ni por ... ni! .....	3
Moneroj & medaloj .....	4
<i>Medalo de Toleremo</i>	
<i>Polica medalo por altmerita esperantisto de Antverpeno</i>	
<i>Meritmedalo de GEA 1994</i>	
<i>Ĉu jen la plej olda konata Esperanto-medalo?</i>	
Spikumajoj & suplementoj: Jubileaj UMEA-diplomo kaj -medalo .....	12
Nekrologo .....	13
Por spuremuloj! .....	14
Aspektoj de numismatiko: Plumbaj sigeloj kaj aliaj sigeliloj (2) .....	15
Medalistoj: 21 Damir Mataušić (°1954).....	19
Historiaj aspektoj: Esperanto - numismatiko en uniformo (5) .....	20
Terminaro: alfabeto listo (21) .....	23
Numismatika Forumo: Ĉu esperantistoj bezonas propran valuton?.....	24
El la gazetaro: Submara arĥeologio kaj numismatiko .....	28
Retpoŝto .....	29
Anoncoj & eventoj .....	43

## *Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)*

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts	Kontakto: bert.boon@skynet.be
Provlegado: Jozefo Horvath	Retejoj: <a href="http://ena.frali.bplaced.net">http://ena.frali.bplaced.net</a>
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!	<a href="http://www.esperanto.es/biblioteko">www.esperanto.es/biblioteko</a>
Finredaktoro: Bert Boon	<a href="http://www.esperanto.cc/kolektado/numismatiko/">www.esperanto.cc/kolektado/numismatiko/</a>

## DE NI POR ... NI!

Ĉi-matene ni aŭdis la mesaĝon, ke en Ĉinio hodiaŭ, la 19an de marto, unuafoje ekde la komenco de la Kovid-19a krizo, neniu nova infektita persono estas registrita. Fine do iom da espero por ĉinoj kaj loĝantoj de ĉiuj aliaj landoj en la vasta mondo, kiuj senĉese batalegas kontraŭ ege danĝera – ĉar nevidebla – malamiko.

La milito ankoraŭ ne finiĝis, sed venis freŝa espero. Malgraŭ la multaj forpasintaj viktimoj, ĉie diversspecaj medicinistoj kaj aliaj prizorgantoj, kiel kuracistoj, geflegistoj k.a. ege kuraĝe luktas kaj luktos por savi plejeble multajn sammondanojn: infanojn, mezaĝajn kaj maljunajn personojn.

Kiel gefratoj de nia tutmonda proksimularo kaj simpatiuloj de la historia, memoriga valoro de numismatikaĵoj, ni, kiel esperantaj numismatoj, volas instigi la asocion UMEA (Universala Medicinista Esperanto-Asocio) siatempe **eldoni memormedalon, por honori ĉiujn medicinistojn**, kiuj, riskante la propran vivon en “pafdistanco”, faras multe pli, ol oni normale povus peti de ili.

Malgraŭ la neniam forgesebla tragedio la redakcio tamen ne povus ne mencii la numismatikaĵojn, kiuj jam delonge estas preparataj por aperi en 2020.

En Vieno nia membro Walter Klag eldonos en majo la duan memormedalon en la serio “Pioniroj de la esperanta numismatiko”. Post la arĝenta 100-steloj-medalo honore al René de Saussure – la patro de la spesmila unuo – li preparas nun arĝentan medalon de 50 steloj honorigante unu el la pioniroj de la stelo-unuo, nome Julia Isbrücker el Nederlando.



En Kanado (Montrealo), okaze de la venonta UK, nia membro Garry Evens, pretas eldonigi arĝentitan medalon, la unuan kanadan porkongresan memormedalon en la historio de la tiea movado. Kun li ni esperas, ke la Kongreso en Montrealo povos okazi, malgraŭ la pandemio.

Fine ni volas substreki la iniciativon de la Esperanta Civito, kiu post la unua, arĝenta Zamenhof-medalo de 2009, ĉi-jare volas emisii duan samaspektan jubilean, arĝentan medalon. Jen bildo de la unua.



Por subteni la realigon de la tri medaloj ENA kunlaboras kun la iniciatantoj, ĉefe per konsilioj kaj strategiaj informoj. Al ĉiu el ili ni deziras multe da sukcesoj!

Bert

## MONEROJ & MEDALOJ

### Tipo A 2 – Esperanto - medaloj kun ne-esperanta(j) aldono(j)

#### Medalo de Toleremo



Lando: Pollando

Metalo: bronzo (orkolora)

Diametro: 115 mm

Jaro: 1999

Kvanto: 30

Pezo: 501 g

Medalisto: Dymitr Grozdew

Diko: 7 mm

#### **Averso:**

ĉirkaŭa surskribo sube: "L.L. ZAMENHOF"

Bildo: busto de Zamenhof

Meze maldekstre: surskribo BIAŁYSTOK, bildo de la Branicki-palaco

#### **Reverso:**

Ĉirkaŭa surskribo: "T O L E R A N C J A TOLEREMO"

Meze: du manoj tenantaj branĉeton

#### **Rimarko 1:**

La medalo estas premio, donata al personoj aŭ institucioj, kiuj montras absolutajn toleremon kaj respekton koncerne diversecon en la kampoj de kulturo, nacieco, sekso kaj religio.

### ***Rimarko 2:***

La unua Tolerema Medalo estis enmanigita en 1999. Sekve ĝi estis atribuita al prof. Władysław Bartoszewski, al Jerzy Owsiak, Fundacja Pogranicze z Sejn, Urszula kaj Giuseppe Grattapaglia, al la Internacia Skolta Movado (*vidu foton*).k.a.



*A.Löwenstein, R.Corsetti (meze) kaj E. Missoni dum la ceremonio*

### ***Rimarko 3:***

La kapo de Zamenhof aspektas kiel tiu sur la pola medalo okaze de la centjara jubileo de Esperanto, ankaŭ eldonita en Bjalistoko.



*vidu ankaŭ jarkolekton 4 numeron 3*

### ***Rimarko 4:***

Averse sur la medalo: Branicki-palaco, fama monumento en Bjalistoko.



*Ni kore dankas sinjoron Roman Dobrzyński pro la senditaj informoj pri tiu medalo.*

## Tipo B 2 - Ne-esperantaj medaloj kun esperanta(j) aldono(j)

Polica medalo por altmerita esperantisto de Antverpeno



Lando: Belgio

Kvanto: *serĉata*

Metalo: bronzo

Pezo: 52 g

Mezuroj: (61 – 64 mm) x 45 mm

Medalisto: *serĉata*

Jaro: 1931

Diko: 2 mm

### **Averso:**

supre: du kverkbranĉetoj ambaŭflanke de du kunigitaj manoj, simbolo de fratiĝo. En la romia kulturo kverkobranĉoj honoris homon, kiu savis la vivon de aliulo, laŭkrono venkinton.

meze: bildo de virkoko kaj fone parto de la urba pejzaĝo kun aŭroro.

sube: nederlandlingve: DE POLITIEVERBROEDERING VAN GROOT ANTWERPEN (La polica frataro de Granda Antverpeno).

### **Reverso:**

surskribo: “Sekcio: A.P.G.E. / memoraĵo ofertita / al nia Profesoro / Sro. DESCHUTTER Willy / Kurso 1931”

### ***Rimarko 1:***


A.P.G.E. = Antverpena Polica Grupo Esperantista

### ***Rimarko 2:***

**Willy De Schutter** estis membro de la antverpena Esperanto-grupo “La Verda Stelo” kaj instruanto de esperanta baza kurso ĉe la urba polico. Per la priskribita medalo la kursanoj honoris lin post la kurso de 1931.

### ***Rimarko 3:***

Inter la du mondmilitoj Esperanto estis populara ĉe la antverpenaj policistoj. Pro instigo de komisaro Derweduwen multaj policistoj membriĝis ĉe la A.P.G.E. Je kulmino tiu grupo konsistis el pli ol 50 policistoj parolantaj esperante. De la urbestro ili eĉ ricevis oficiale la rajton surhavi esperantan insignon sur la uniformo.



*La policistoj-esperantistoj kiuj estis preparantaj la dekan U.K. de 1928.*

Frans Schoofs (grupestro)

Komisaro Derweduwen

Willy De Schutter (instruanto)



Post la kongreso la LKK de la UK 1928 donacis tian dankmedalon kun gravurita nomo i.a. al la policista esperantista grupo kaj al sia instruanto Willy De Schutter.

## Tipo A 1 - Esperanto-medaloj

### Meritmedalo de GEA 1994



Lando: Germanio

Kvanto: *serĉata*

Metalo: arĝento (polurita)

Pezo: 2,6 g

Diametro: 40 mm

Medalisto: *serĉata*

Jaro: 1994

Diko: 3 mm

#### ***Averso:***

busto de Zamenhof maldekstren

Supra surteksto: “GERMANA ESPERANTO-ASOCIO”

Suba surteksto: “PRO LA MERITO”

#### ***Reverso:***

gravuritaj nomoj de la distingitaj persono aŭ asocio:

- Margaret Brandenburg (1993)
- Esperanto-Grupo Aalen (1994)



### ***Rimarko 1:***

GEA = Germana Esperanto-Asocio. Ĝi estis fondita en 1906 kaj ricevis tiun (novan) nomon okaze de la 4a Germana Esperanto-kongreso en Gotha, organizita de d-ro Carl Rohrbach.

### ***Rimarko 2:***

la medaloj supre estis aljuĝitaj unuflanke al Margaret Brandenburg, kies filo Ulrich sendis la bildojn al la redakcio, aliflanke al la Esperanto-grupo de la germana urbo Aalen. Tiu dua bildo estis sendita de sinjoro Utho Maier, direktoro de la Esperanta Biblioteko de la urbo Aalen.

### ***Rimarko 3:***

meritmedalo estas premio. GEA aljuĝis premion al meritaj germanaj esperantistoj kiuj grave antaŭenigis la germanan Esperanto-movadon. Ekde 1959 ĝis 1990 la distingindoj ricevis specon de “broĉo” (donaco de Felix Epstein el Hamburgo). Ekde 1991 la merituloj ricevis ekzempleron de ĉi tiu “medalo Zamenhof”.

### ***Rimarko 4:***



*La diametro estas 3,5 cm. Ĝi troviĝas en bela nigra medalujo, interne kun verda veluro aŭ simile.*

Jen ekzemplero de la t.n. broĉo, atribuita al sinjoro Otto Pilhofer el Nurenbergo, kiu ricevis ĝin en Berlino en 1960. La bildojn sendis al la redakcio Zsófia Kóródy kaj Petro Zilvar el la fama germana Esperanta Urbo (Herzberg).

*ENA elkore dankas sinjorojn Utho Maier, Andreas Diemel, Jan Niemann, Ulrich Brandenburg kaj fam.Zilvar*

## Tipo D 1 - Esperantaj unuflankaj medaloj

Ĉu jen vere la plej olda konata Esperanto-medalo?



Lando: Germanio (?)

Kvanto: *serĉata*

Metalo: bronzo

Pezo: *serĉata*

Mezuroj: 71 x 50 mm

Medalisto: Friedrich Moritz Brodauf

Jaro: 1909

Diko: *serĉata*

### ***Averso:***

unuflanka plaketo kun listelo

meze: busto de Zamenhof maldekstren

supre: surteksto "Fr. Brodauf 1909"

sube: "L.L. Zamenhof"

### ***Rimarko 1:***

En la rubriko "Medalistoĵ" (*jk. 5 n-ro 3, p. 18*) ni jam preparolis la medaliston kaj montris la medalon. Portreto aŭ foto de Brodauf estas senĉese *serĉata*!

### ***Rimarko 2:***

Longtempe, sed tro antaŭtempe, ni supozis, ke ĉi tiu plaketo el 1909 estis la modelo por la "spesmilo"-medaloj de la jaro 1912. Artikolo de la eminenta nederlanda numismato F. Boegheim kontraŭdiras tiun supozon, menciante la interparolon kun Andreo Cseh koncerne la preparon de la fabrikado de la stelo-moneroj. En la daŭro de la konversacio en la medalejo de Utrecht estis preparolata ankaŭ la monerfiguro, kiun oni dezirus farigi profile sur bronza

plaketo (*preparcele de la definitivaj stelo-moneroj*). Laŭdire la plaketo uzita kiel modelo por la spesmiloj estus ankoraŭ en Svislando ĉe la firmao “Holy Frères”, sed ĝi ŝajnis “forvaporiginta”. Anstataŭe oni uzis raran ekzempleron de la spesmila monero mem por kopii la bildon. (vidu jk. 2 n-ro 1 p. 4)


Detala komparo de la 1909a-jara plaketo kun la spesmilo-moneroj de 1912 montras tamen tro multe da diferencoj. Ekzemple la pozicio de la kapo (oni vidas aŭ du aŭ nur unu flankon de la okulvitroj), mankas la insigno sur la maldekstra roverso, alia aspekto de la orelo k.a.

Vidu ankaŭ: jk. 3 n-ro 3 p. 13




### Rimarko 3:

Jen du fotoj de la plaketa medalo sur bildkartoj. Sur la maldekstra enigme mankas la surskribo en la dekstra, supra angulo.



## *SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ*

Jubileaj UMEA-diplomo kaj - medalo pro merito / Kortrijk 1989



*La dokumento troviĝas en la biblioteko de la fonduso Van Biervliet en Kortrijk (Belgio)*



*Priskribita en jarkolekto 2, numero 3, p. 7*

# NEKROLOGO

## Denove forpasis fidela ENA-membro



**William R. HARMON** (naskiĝis en 1927 en El Dorado, Kansaso, mortis la 27-an de novembro 2019 en maljunulejo en suda Oregono) estis usona esperantisto. Li loĝis longan tempon en San Pablo, norda Kalifornio.

Li translokiĝis al Kalifornio en 1938. Dum la dua mondmilito li estis militmaristo, plejparte en la Atlantiko kaj Mediteranea Maro. De 1949 li profesiigis en la transporta fako, unue ĉe la Fervojo Santa Fe dum 17 jaroj kaj poste kun diversaj martransportaj kompanioj. Li emeritiĝis en 1990 de Matson Navigation Company kiel Vicprezidanto kaj estro de la fako pri tarifoj. Krom edzino Lusi, lia familio konsistas el tri filoj, sep genepoj, kaj sep pragenepoj.

Li esperantistiĝis en 1939 en Losanĝeleso de instruisto John Clewe. Li estis aktiva en la Esperanto-Klubo de Losanĝeleso ĝis milita servo en la Usona Militmaristaro ekde 1944 kaj kunfondis Esperanto-klubon en Long Beach, Kalifornio kun William O. Wanzer. William instruis Esperanton sur militŝipo USS Franklin D. Roosevelt inter 1945 kaj 1947, kontaktante multajn esperantistojn en Eŭropo, Afriko kaj Brazilo dum tiu tempo.

Dum trijara loĝado en Japanio 1972-75, li estis aktiva en diversaj japanaj Esperanto-organizoj. Li ofte prelegis, vizitis Ĉinion plurfoje, en unu okazo helpe al la planado de la Pacifika Konferenco en Qingdao, Ĉinio en 1992. Aktiva en la usona nacia organizo ELNA ekde tuj post ties komenco en 1952, li establis la iaman Centran Oficejon de ELNA en Kalifornio en 1975. Li estis estrarano de ELNA 1958-1960 kaj 1966-1997, entute 35 jarojn; prezidanto de ELNA 1976-1981; kaj estrarestro 1965-1967. ELNA nomis lin Honora Membro en 1992.

Krome li estis ĉefdelegito de UEA en Usono ekde 1987 kaj ĉeestis multajn Universalajn Kongresojn. Lia edzino Lusi reprezentis la usonan esperantistaron kiel Komitatano A de UEA. Ekde 1993 li estis dum ses jaroj kunordiganto de la Elekto-komisiono de UEA. UEA nomis lin Honora Membro de UEA en 1998.

Li verkis anglalingvan *Historio de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko* (2002) kaj ofte servis kiel interpretisto en esperantistaj vojaĝgrupoj kaj ĉe publikaj prezentadoj. Li esperantigis du gravajn verkojn de Ĉefo Luther Standing Bear, *Mia indiana knabeco* kaj *Historietoj de la Siuoj*, ambaŭ publikigitaj de Eldonejo Bero.

*Auld, William 1976: Letero al William R. Harmon, en Facetoj de Esperanto, Brita Esperanto-Asocio, pp. 49-51.*

*Fonto: Vikipedio*

## POR SPUREMULOJ!

*En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ preskaŭ nenion. Helpu nin!*

### 15a enigmo



Kiam s-ro S.R. (unu el niaj ENA-membroj) unue vidis tiun foton en Interreto, li tiel reagis: *“Mi kolektas E-monon, sed dolarojn kun Zamenhof mi ankoraŭ ne vidis. Gratulon. Ĉu ĝi estis cirkulanta mono?”*

Iu Pavla tiel reagis: *“Bedaŭrinde ne. Estis nur unu el la fototrukoj, kiujn mi faris por plezurigi niajn vizitantojn, ja muzeoj ne estu nur serioza afero! P.S. Sekvos pliaj en la albumo “Vere aŭ fantazie?”*

**Nun sin demandas la redakcio de ENA: ĉu temas koncerne la suban peseto-bileton ankaŭ pri “fototruko”, aŭ ĉu ekzistas iom pli serioza klarigo?**




# ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

## Plumbaj sigeloj kaj aliaj sigeliloj (2)

Verkis: Raf Van Laere

Tradukis Bert

### 1. Tubosigeloj (*angle: tubular seal; germane: Rohrplombe*)



Ofte estas malfacile distingi dutruetajn sigelojn de tuboplumbaj sigeloj, ĉar ambaŭ havas du truetojn. Tamen la tuboplumbaj estis nur uzataj por sigeli tekstilaĵojn. Do, kontraŭe al dutruetaj sigeloj, ili estis rekte (do sen ŝnureto) ligataj al tekstilaj objektoj. Dum la teksado ili estis ŝovataj super la fadenojn de la teksobazo (vertikala fadenaro) kaj teksataj en la tekstilaĵon. Tial preskaŭ ne eblis forigi ilin sen damaĝi la tekstilaĵojn. La plej antikvaj al mi konataj tuboplumbaj sigeloj datas el la 14a jarcento. Tamen ili neniam vere estis ŝatataj kaj ekde la 16a jarcento ili estis nur sporade uzataj dum la unua duono de la 17a jarcento. Tiu sigelo estis tipa por la tiamaj Unuiĝintaj Nederlandoj (nuntempe: ĉefe Flandrio kaj Nederlando).

Ekzemple, spuroj en Britio pruvas, ke teksistoj enmigris kaj daŭrigis labori sammaniere kiel en la devena lando. Kontraŭe al la ofta opinio, ke tuboplumbaj sigeloj estus oblongaj, tio ne estis regulo. La aspekto ege dependis de la formo de la blanko. En la flandra urbo Ipro dum la 14a jarcento estis aplikataj multangulaj blankoj, kiuj aspektas kvazaŭ rondaj post la sigelado, tiel ke ili estas malfacile distingeblaj de pli klasikaj sigeltipoj. Dum la 15a jarcento en Bruĝo (alia flandra urbo) estis uzataj grandaj, rondaj tuboplumbaj sigeloj, kiuj same malfacile estas distingeblaj de aliaj tipoj. Ofte, sed tamen ne ĉiam, la oblongaj sigeloj montras romiajn ciferojn aŭ kalkulmarkojn, por precizigi la longecon de la tekstilaĵoj. La blankoj de tiaj sigeloj do estis nur sigelataj, post kiam la finlaboritaj tekstilaĵoj estis mezuritaj.

### 2. Kejloplumbaj sigeloj aŭ ĉarnirsigeloj (*angle: riveted seal; france: sceau à plataux; germane: Stiftplombe, Scheibenplombe, Zweischeibenplombe*)



Ekde la Mezepoko ĝis la komenco de la 19a jarcento alia tipo estas tre populara: la kejloplumba sigelo aŭ ĉarnirsigelo. Tiu sigelo ofte estas malkorekte nomata “**drapoplumbo**” (*angle: cloth seal*). Ĉarnirsigeloj konsistas el du plumbaj disketoj ligitaj per ĉarniro. Unu el ili havas kejlon, metatan en la harmoniantan trueton de la dua disketo por povi sigeli kunfaldante.

El la arkeologia kunteksto, en kiu tiu tipo estas trovata, oni povas konkludi, ke ĝi laste ekde la mezo de la 13a jarcento estis aplikata ne nur en la Nederlandoj, sed ankaŭ en apudaj regionoj de Germanio. Ĝis hodiaŭ ne certas kie kaj kiam tiu tipo, nekonata en la Bizanca Regno, evoluis. Ĉar, probable ĝi unue aperis en la Nederlandoj, kie ĝi verŝajne ekestis kaj sekve dise estis uzata en Eŭropo. Pro manko de studoj ankaŭ ne maleblus, ke la origino serĉendas en Italio. Certas tamen, malgraŭ fruaj spuroj de kejloplumbaĵoj el la sudaj Nederlandoj krome en Orienta Eŭropo (i.a. en Novgorodo kaj Saraj al-Jadido, unu el la iamaj ĉefaj urboj de la Ora Hordo), ke tiu tipo ne estis aplikata ekster Okcident- kaj Sud-Eŭropo.

Kvankam ĉarnirsigeloj estas principe malpli facile kaj nerimarkite forigeblaj ol dutruetaj sigeloj, tamen eblas per lerteco kaj bonŝanco forigi kaj reuzi ilin sufiĉe nerimarkite. En la daŭro de la tempo la sekureco estis pliefikigata per kromaj sistemoj. Ĉefe per adopto de la sekuriga aŭ de la ferma kejlo. Pri tio ankoraŭ pristudado necesos.

Laste ekde la 14a jarcento en la Nederlandoj, i.a. en Ipro, samtempe disponeblas ĉarnirsigeloj kun unu aŭ kun du sekurigaj kejloj. Ambaŭ preskaŭ tute similas, sed ne estas klare, kial foje unu foje la alia estas uzata. Ĉiel, ili estas aplikataj ĝis la komenco de la 19a jarcento. Intense afinaj estis la ĉarnirsigeloj kun splitita sekuriga aŭ rigla kejlo, kutimaj de la 15a ĝis la 18a jarcentoj. Ekde la fino de la 16a aŭ la komenco de la 17a jarcentoj la du tipoj estis kombinitaj kiel ĉarnirsigeloj kun du splititaj kejloj, probable ekestintaj en



Holando (regiono de Nederlando), sed ankaŭ troveblaj en Pollando pro influo de Holando. Tamen ili ankaŭ ekzistis alie, i.a. en Hispanio, kie dum la dua duono de la 17a aŭ la komenco de la 18a jarcentoj eĉ sigeloj kun kvar kejlaj estis uzataj.



Estas ankoraŭ pristudenda, ĉu tio okazis jes aŭ ne pro holanda influo.

Flanke de tio oni konstatas, ke diversaj regionoj havis proprajn kutimojn koncerne la fabrikadon de senstampaj sigeloj. Tipe por hispanaj sigeloj el la 17a kaj 18a jarcentoj estas ekzemple la granda, centra sekuriga kejlo, kiu eĉ post la sigelado restas okulfrapa kaj eĉ foje kovras parton de la figuro. En kelkaj regionoj mallongtempe estis uzataj tipoj, kiuj restis surloke. Bona ekzemplo estas la franca urbo Valenciennes [valansjen]. Tie dum la 15a jarcento oni foje uzis du ĉarnirsigelojn kun centra sekuriga kejlo, kiuj estis ligataj per maldika plumba bendo; pro tio ili aspektas kiel duoblaj sigeloj. Eĉ poste estis fabrikataj novaj tipoj kun limigita aplikado. Ekzemple dum la 17a jarcento en Francio nova tipo havas rekonmarkojn kaj de ĉarnir- kaj de malsuprenpendaj sigeloj. Ĝi havas duoblan, eĉ trioblan ĉarniron, kies lipaspekta finaĵo estis martelata en la sigelan diskon. Tiaj sigeloj estis aplikataj nur en Francio, por fiskcele sigeli tabakaĵojn. Ekzistas do afinco kun francaj sigeloj dekok- kaj deknaŭ-jarcentaj el Savoie [savŭa] kiuj estas trapikitaj diskoj kun “pikilo”, kiu trairas la diskon dum la sigelado. Ankaŭ ĝi estis aplikata nur en la regiono mem.

### C) Sigelado en Anglio

Tute alian evoluon ni trovas en Anglio. Surbaze de klasikaj ĉarnirsigeloj kun unu aŭ du sekurigaj kejlaj ekestis tipoj, kiuj apenaŭ aŭ neniam estis uzataj en la eŭropa kontinento. Tio eble startis je la fino de la 15a aŭ komence de la 16a jarcentoj, kiam la registaro ekaranĝis la stimuladon de la propra tekstila industrio. Eble ankaŭ rolas la ŝanĝo en la funkcio de sigeloj uzotaj kiel kvalitmarkoj. Tio estas ankoraŭ pristudenda. Tipe por la novaj anglaj sigeloj estas, ke la sekuriga kejlo ne plu estas konektata al la sigelo mem, sed ke ĝi troviĝas je la rando de la disko. La ekstera firmiga stifto estis tirata tra ringeton, kiu

troviĝas ekster la sigela supraĵo. El la centra riglado do estiĝas ekstera riglado. Tiu tekniko kaŭzas nun problemon por rekoni sigelajn fragmentojn, se la delikataj ĉarniro aŭ la rigla ringeto estis forrompitaj. En tiu kazo nur restas ornamita disketo kiu povus esti uzita kiel sigela fragmento aŭ kiel insigno.

Je la komenco dum la riglado ne estis aldonata ilustraĵo aŭ stampo sur la eksteran riglon. Detaloj nutras la impreson, ke fojefoje sigeloj estis jam ilustrataj antaŭ la riglado, pro kio la fidindeco kiel kvalitatgarantio estis dubenda. En la daŭro de la jaroj la eksteraj rigloj pligrandiĝis kaj ankaŭ ricevis ilustraĵojn, tiel ke estiĝis duoblaj sigeloj, kiuj ofte montras tri ĝis kvar bildojn. Ankaŭ la riglo foje ŝanĝiĝis. Kial oni preferis foje splititan eksternan riglon estas ankoraŭ enigmo. La plimulto de la grandaj ekzempleroj estas orita, celante sendube rigardokaptilon por eventualaj aĉetontoj, kiuj estus persvadataj koncerne la kvaliton dank' al tiu per "oro" sigelitaj tekstilaĵoj.



Dum la 17a jarcento la angla registaro aplikis etajn, maldikajn duoblajn sigelojn por konfirmi, ke la devigaj taksoj estis pagitaj. La sekuriga stifto poste evoluis kaj iĝis denove ekstera riglo, tiel kaŭzante la impreson, ke baldaŭ venos trioblaj sigeloj, kiuj tamen neniam estis venontaj, ĉar dume la kutimo sigeli tekstilaĵojn per plumbaj sigeloj malaperis.

Do, sigeloj kun eksteraj rigloj estis tipaj por Anglio kaj ili estis tre malofte uzataj sur la kontinento, escepte en Portugalio kaj kelkloke en Germanio, i.a. en Wesel [vesel] kaj Meiningen [majningen]. Tamen estas konataj kelkaj sigeloj kun blazonŝildoj en eksteranglaj urboj kiel Haarlem kaj Leiden [lajden] (ambaŭ en Nederlando), sed en tiuj kazoj temas pri anglaj tekstilaĵoj kiuj imitas holandajn ekzemplojn.

Daŭrigota

## MEDALISTOJ

### 21 Damir Mataušić (°1954)



La artisto-medalisto D.Mataušić naskiĝis la 15an de julio 1954 en Zagrebo (Kroatio).

En 1974 li finstudis en la mezlerneja sekcio de aplikataj artoj, precipe koncerne la teknikojn kaj la kreativecon, ambaŭ necesaj por prilabori metalojn. Poste li famiĝis i.a. pro lia impona, tutmetala kaj grandformata maketo de la urbo Zagrebo.

En la sama jaro li ekdaŭrigis la studadon en la Akademio pri Plastikaj Artoj. Tie li finstudis en 1979 en la sekcio por etaj plastikaĵoj kaj por medalista arto. En tiu sekcio li poste eĉ profesoriĝis.

Ekde 1974 Damir partoprenis en ĉirkaŭ 19 komunaj ekspozicioj, i.a. en FIDEM (la famega internacia ekspozicio de medaloj), krome en Parizo, Londono, Budapeŝto, Neŭŝatelo, Hago, Lisbono k.a.



Li estas la aŭtoro de 21 jubileaj medaloj de la respubliko Kroatio, parte en arĝento, parte en oro. Li ankaŭ kreis naŭ oficialajn monerojn, el kiuj unu kun la temo Esperanto (*vidu sube*). Entute li skizis 150 orajn kaj 550 aliajn medalojn, parte duflankajn, parte starantajn.

Al li estis atribuitaj diversaj premioj kaj pluraj distingoj. La plimulto de liaj numismatikaĵoj troviĝas en la arkivo de la “Muzeo- kaj Galerio-Centro” en Zagrebo, krome en la Olimpia Muzeo en Laŭzano kaj en la kolekto de la Vatikanmuzeo. Multaj aliaj troviĝas en muzeaj kaj privataj kolektoj kaj en Kroatio kaj eksterlande.

Li meritis siajn spronojn ankaŭ kiel skulptisto.



*Tiun oficialan kroatian moneron ni jam montris kaj priskribis en jk. 3 n-ro 4 p. 8*

# HISTORIAJ ASPEKTOJ

## Esperanta numismatiko en uniformo (5)

### D. “Estu preta”

#### 1. Historio de Skolta Esperantista Ligo (SEL)

“Enciklopedio de Esperanto”, eldonita de SAT en 1933, publikigis sufiĉe ampleksan artikolon sub la titolo “Skolta Movado” (p. 495).



En la unua alineo estas menciitaj la fondo de la skoltista movado far lordo Baden Powell en 1908 kaj la senĉesa sukcesa evoluo.

Sekve estas pentrita, kiel estis fondita en 1918 “Skolta Esperantista Ligo” (SEL) far angla trupestro A. W. Thompson, kiu ekpensis la projekton sur franca militkampoj. La celoj de SEL estas: disvastigi skoltajn idealojn per Esperanto; disvastigi nian lingvon inter la skoltoj; krei skoltan Esperanto-literaturon; eldoni internacian skoltan revuon; solidarigi la senton de frateco, komunan en la skolta kaj la esperanta movadoj, inter diversnaciaj junuloj. Tiucele SEL do organizis diversajn tendarojn. En skolta jamboreo en 1929 (Birkenhead) ĉeestis centoj da esperantistaj skoltoj el 18 landoj.

Absoluta mejloŝtono estis sendube la IV-a mondjamboreo de 1933 en Gödöllő (proksime al Budapeŝto). Unuafoje SEL estis oficiale envolvita en diversaj aspektoj de la kongresa organizado. Entute 200 esperantaj skoltoj partoprenis en la evento. Ĉe la poŝtofiĉejoj oni ricevis senpage esperantlingvan “Memorfolio”, donacitan de UEA kaj Literatura Mondo.

Krom regule aperantan skoltan revuon, SEL kreis ankaŭ interpretistan insignon, rekomendatan de Baden Powell en sia libro “Scouting for Boys”.





Belga Skolta Ligo oficialigis Esperanto-ŝtofinsignon. La Hungara Skolta Asocio eldonis i.a. rubandeton kun teksto “Mi parolas Esperanton”.

En la belga urbo Tienen la loka grupo “La Hirundo” fondis en 1992 sekcion de SEL-Belgio (kun tiama estro Arie Bouman), kiu mem estis landa sekcio de la internacia SEL. La Hirundo kunlaboris kun ne-esperantaj grupoj de katolika kaj liberpensa skoltaj asocioj kaj mem dum 25 jaroj organizis kursojn por geskoltoj, gelernantoj de lokaj bazaj lernejoj kaj eĉ por plenkreskuloj, surbaze de la fama CSEH-metodo kaj kurslibroj kompilitaj de la nederlanda skoltestro-esperantisto Ko Hammer.

## 2. Skoltaj esperantaj numismatikaĵoj

### a) Insignoj



b) medaloj



Bronza kaj arĝenta skoltaj medaloj, eldonitaj de “La Hirundo”, sekcio de Skolta Esperanto-Ligo, okaze de duobla jubileo: 125 jaroj de Esperanto (1887-2012) kaj 20 jaroj de “La Hirundo” (1992-2012).



*Vidu jarkolekton 4, numeron 1, pp. 7-8.*

# TERMINARO

## Alfabeto Listo (21)

**Brakteato:** el la latina “bractea”, kiu signifas “maldika metala plaketo”. Ankaŭ moderna termino por maldikaj, unuflankaj oraj kaj arĝentaj moneroj. Stampita en la reversan flankon, tiel ke la bildo estas videbla reliefo en la averso.

**Eksonumio:** kolektiva nomo por alternativaj numismatikaĵoj, kiel kriptaj, lokaj kaj privataj monunuoj.

**Enringa pregado:** pregado pere de pormonera ringo

**Fonta trovaĵo:** montraĵo en fontoj kaj fontanoj. Plejofte temas pri intence enĵetitaj moneroj, pasintece pro religiaj motivoj, aktuale ankaŭ kiel turisma kutimo, ekzemple en la famegan Trevi-fontanon en Romo.

**Groŝmono:** apunto, moneroj kun malalta valoro.

**Kripta monunuo:** valoro de iu sumo kun kripta (alternativa) monunuo. Speco de diĝita monunuo uzata kiel alternativo por oficiala monunuo. La plej (fi)fama ekzemplo estas bitmono.

**Loka monunuo:** loka (alternativa) monunuo uzata en specifaj geografiaj lokoj aŭ regionoj, celante stimuli aĉeteblojn de lokaj varoj.

**Nemetalismo:** nomo de la mona teorio, kiu propagandas la valoron de la papera standardo. Laŭ ĝi mono ne valoras pro la interna valoro de la nobla metalo en la monero. La teorio estis ĝenerale akceptita en 1930.

**Permonera ringo:** juvelo farita el (oficiala) monero.

**Pormonera ringo:** ŝtala ringo uzata por ke la metalo de la disketo havu rondan, simetrian randumon post la pregado. Tiel eblas ankaŭ krei noĉan randon kaj randan surskribon.

**Privata monunuo:** alternativa neoficiala monunuo uzata en iu ento, ĉu private, komerce, neprofite aŭ de malcentralizita entrepreno.

**Senringa pregado:** pregado sen uzo de pormonera ringo, kiel en la antikvaj kulturoj.

**Ŝparmonujo:** ujo por konservi ŝparmonon.

**Tombako:** (el la malajzia “tambaga” = kupro) ĉipa alojo konsistanta el 70% da kupro, 5 ĝis 20% da zinko kaj iom da stano, plumbo kaj / aŭ arseno. Ĝi aspektas kiel latuno, sed estas pli orkolora, tial ofte nomata “ruĝa latuno”. Preferata por fabriki malaltajn ordenojn kaj malmultekostajn juvelojn. La surfaco estas rustimuna kaj tre brila.

**Troja unco:** 31,1035 gramojn da fajna oro.

# NUMISMATIKA FORUMO

## Ĉu esperantistoj bezonas propran valuton?

*Lastatempe furoras ciferecaj valutoj kiel bitmono. Unu el ili eĉ havas esperantan nomon: monero. Pli frue esperantistoj kreis kaj eĉ iom uzis proprajn valutojn kiel "spesmilo" kaj "stelo". Robert Nielsen demandas sin, ĉu eble indus, ke esperantistoj ekuzu propran ciferecan valuton.*



Esperanto estas internacia lingvo, sed ĉu ni bezonas internacian valuton? Ĉe ĉiu kongreso, homoj venas el malsamaj landoj, por uzi komunan lingvon, sed ĉu ili ankaŭ povus uzi komunan valuton? Nuntempe estas granda kresko de ciferecaj monoj (interretaj valutoj) kiel bitmono, kaj tio pensigis min. Imagu se nia komunumo havus valuton.

Fakte la internacieco de Esperantujo malfaciligas la uzon de nacia valuto. Ekzemple, ĉe la Universala Kongreso venas homoj el 60-70 landoj kun multegaj malsamaj valutoj. Estas vere malfacile por la organizantoj regi tiom da valutoj, kaj se estus nur unu, tio multege plifaciligus la aferon. Ĉiuj perdas monon pro la monŝanĝaj kotizoj, do se estus internacia valuto, ĉiuj ŝparus monon. La revuo *Esperanto* fanfaronas, ke ĝi havas abonantojn en 120 landoj, sed tio signifas multajn valutojn. *Kontakto* listigas sian prezon en 15 valutoj ĉe la unua paĝo de ĉiu numero. Kompreneble la kreado de la eŭro certe helpis malgrandigi la liston, sed ankoraŭ estas multaj.

Ĉi tio ankaŭ povus subteni kreemajn esperantistojn. Verkistoj, muzikistoj, filmmetistoj povas krei materialon kaj fortigi nian kulturon, nur se la komunumo subtenas ilin. Sed, bedaŭrinde, tre malfacilas gajni sufiĉe da mono por vivi per Esperanto, kaj la plejparto de la kreintoj estas volontuloj. Malfacilas donaci pro teknikaj problemoj, bankadministrado ktp, do la afero estas komplika eĉ por malgrandaj sumoj.

Imagu se anstataŭe ĉiuj blogistoj kaj vlogistoj simple donus sian kont-numeron ĉe la fino de la artikolo aŭ filmeto. Se oni ŝatas kaj volas subteni, oni povas facile alklaki la butonojn kaj tuj sendi monon por danki. Se ni havus nian propran valuton, oni ne bezonus kontroladon de bankoj aŭ la longegan atendon de la UEA-konto. La plej bona parto estas, ke oni povus sendi eĉ etajn sumojn. Se multaj homoj farus tion, entute estus granda sumo. Ĉi tiuj "pagetoj" povus subteni kaj interligi nian komunumon.

Honeste, alia bona kialo por krei valuton simple estas, ke tio estus mojosa. Ĉu ne estus mojose, se ni havus nian propran monon? Kio estas Esperanto – lingvo kun flago, himno kaj valuto. Estus amuze havi nian sekretan monon, kiun nur ni konas. Eĉ se homoj uzus ĝin



nur por ŝajna ludo, tio estus amuza, miaopinie. Ĝi povus vekti intereson el la ekstera mondo kaj allogi novajn homojn. Ĝi estus ekzemplo de la tutmondeco de Esperanto kaj la kunlaboremeco de la komunumo.

**Ekzistas longa historio** de multaj provoj krei valuton por Esperantujo. En 1907, oni kreis la spesmilon, kiu strebis esti internacia banksistemo, sed ĝi malaperis post la unua mondmilito. Inter 1947 kaj 1993 ekzistis la “stelo”, kiu strebis esti internacia valuto kaj solvi la problemojn, kiujn mi jam menciis. Oni volis havi komunan monon, por pagi por revuoj kaj kongresoj. Do mia ideo simple estas nova versio, sed ĉi-foje interrete. Oni povus nomi ĝin nova stelo.



Plastaj stelo-moneroj de 2012

Fakte dum junularaj kongresoj jam ekzistas “valuteto”. Kutime troviĝas trinkejo, sed ĉiam estas valutaj problemoj, ĉu oni uzu la lokan valuton aŭ la pli grandan eŭron, sed estas multaj homoj, kiuj havas nek nek. Pli facilas por ĉiuj, se estas nur unu menuo, ne multaj laŭ valutoj. Do, dum la pasinta JES, la trinkejo akceptis nur stelojn, plastajn ĵetonojn kun fiksita interŝanĝa valoro (pola zloto valoris unu kaj eŭro valoris kvar). Imagu se ni konvertus ĝin al vera valuto.

UEA preskaŭ jam havas sian propran bank-sistemon, la UEA-kontojn, sed ĝi estas prasisistemo. Mi povas sendi monon al iu alia membro de UEA kaj pagi por kongresoj per la kontoj. Sed la sistemo estas tre antikva kaj malrapida. Por sendi monon, mi devas sendi retmesaĝon al la financisto de UEA, kiu eble post kelkaj tagoj sendos la monon. Eĉ por kontroli, kiom da mono estas en la konto, oni devas sendi retmesaĝon kaj atendi kelkajn tagojn. Imagu se oni plibonigus la UEA-kontojn, tiel ke oni povu rapide sendi kaj ricevi monon per sia poŝtelefono?

**Jam ekzistas ĉirkaŭ** 1.500 ciferecaj valutoj (kaj tiu ĉi nombro rapide kreskas). Unu jam havas esperantan nomon. “Monero” uzas esperantan vorton por sia nomo kaj por aliaj partoj, ekzemple “monujo”. Sed 99% el ĝiaj uzantoj ne scias aŭ eĉ ne konas Esperanton, do la nomo estas la sola konekto. Ĉu indas aliĝi al jam ekzistanta valuto kaj konverti ĝin al esperanta mono? Mi ne konsentas, ĉar la plejparto el la homoj, kiuj aĉetas ciferecan monon, nur revas pri riĉeco, ili prifajfas la valuton. Fakte ĉifromono enhavas multajn problemojn, kiuj maltaŭgigas ĝin por uzo en Esperantujo.

En pli frua artikolo mi pritraktis la problemojn kaj difektojn de bitmono, kaj mi opinias, ke estas tre grave, ke ni evitu tiujn problemojn, se ni kreu esperantujan valuton. La unua kaj plej grava problemo estas, ke bitmono ne funkcias kiel valuto. Preskaŭ neniu elspezas ĝin, kaj neelspezinda valuto senutilas. Homoj aĉetas bitmonon, nur ĉar ili volas riĉiĝi, do ili aĉetas kaj atendas ĝis la prezo plialtiĝas kaj tiam ili vendas ĝin. Ili nur spekuladas kvazaŭ ĉe kazino.

Mi ne volas krei valuton, nur por riĉiĝi, mi volas krei ion, kio vere utilas al la komunumo. Estas kelkaj kernaj problemoj kun bitmono kaj aliaj ciferecaj monoj, kiuj malebligas ilin kiel veran valuton. Unue, ili estas ege malstabilaj, kaj la prezo multe fluktuas. Ĉi tio estas katastrofo por valuto. Imagu, se mi volas pagi por kongreso, sed en unu tago ĝi kostas €200, en la venonta €250 kaj poste €150. Mi povus mendi libron, sed kiam ĝi alvenos, la prezo jam estos alia. La valutoj estas malstabilaj ĉar ili estas malcentraj, neniu regas la sistemon. Ne estas iu centra banko, por protekti aŭ gvidi ilin, anstataŭe ili svingiĝas kun la vento.

Ĉar la kvanto de mono estas fiksita, la valuto estas deflacia, kaj ju pli multe da homoj aliĝas, des pli alta iĝas la prezo. Sed se la prezo daŭre plialtiĝas, ne estas instigo elspezi la valuton, fakte estas puno kontraŭ elspezo. Se mi elspezas la monon, kiam la prezo estas 5, sed poste ĝi altiĝos al 10, mi sentas min stultulo, ĉar mi maltrafis la ŝancon duobligi mian monon. Sed se homoj ĉiam atendas plialtiĝon de la valuto, ili neniam elspezas ĝin. Se ĉiuj nur tenas la valuton, atendente altiĝon, tio malstabiligas la valuton.



Esperanta monbileto kiel artprojekto

**Por eviti tiujn problemojn**, mi proponas, ke nia valuto havu centran bankon, preferinde UEA kaj/aŭ TEJO. Por eviti spekuladon, preferindas, ke la prezo estu nmovebla aŭ almenaŭ tre rigida, verŝajne ligita al iu granda valuto kiel la eŭro aŭ dolaro. La centra banko povus facile krei pli da moneroj, por pligrandigi la kvanton de mono laŭ la bezonoj de la valuto. Se la prezo estus tro alta, ili vendus pli, por malaltiĝi la prezon kaj certigi, ke la valuto estu stabila.

Mi proponas UEA aŭ TEJO, ĉar ili estas fidindaj organizoj, kiuj prioritigas la movadon anstataŭ gajni monon. Male ol ĉe multaj aliaj ciferecaj valutoj, oni ne timus, ke ili prirabos nin kaj forŝtelos la monon. Ili jam havas grandan reton de esperantistoj kaj lokoj, kie esperantistoj elspezas monon, kiel la libroservo kaj kongresoj. UEA estas pli granda, sed TEJO estas pli juna kaj malferma al novaj ideoj, do eble ili pli emus regi la valuton.

Mi volus, ke la valuto estu tute neprispeskebla. Se iu profitus per aĉetado kaj vendado de la valuto, tio estus eraro. La celo de la valuto estas uzo kaj utileco, ne spekulado kaj alta prezo. Estu nur unu oficiala vendejo de la valuto (eble la retejo de UEA aŭ TEJO), kaj ni povus eĉ malebligi la vendadon de ĝi.

Se oni aĉetu, oni devu elspezi en Esperantujo aŭ sendi al aliaj esperantistoj. Tio povus esti enspezo por UEA kaj TEJO, kiuj certe bezonas financon helpon. Ĉi tio ankaŭ evitigus la alian grandan problemon de ĉifromonoj, ŝteladon kaj trompon. Multege da vendejoj trompis klientojn kaj prirabis ilin, tial mi proponas unu fidindan vendejon.

**Aliaj ĉifromonoj** havas “blokĉenon”, kio estas publika librotenado. Sed ni ne bezonas ĝin, ĉar kiu volas publikigi siajn elspezojn? Mi ŝatas mian privatecon kaj ne volas, ke ĉiuj povu vidi, kiom mi elspezis en la trinkejo, kaj neniu firmao volas, ke ĉiuj sciu, kiom estas la enspezoj kaj elspezoj. La blokĉeno krome estas tre malefika, ĉar ĝi bezonas multege da komputila energio, por konfirmi pagojn kaj krei novajn monerojn.

Se la centra banko farus tion, tio multe simpligus la aferon. Aliaj ĉifromonoj devas pagi homojn, por ke ili konfirmu pagojn per novaj moneroj aŭ per transpagaj kotizoj. Pro tio, la pagoj de bitmono estas malrapidaj kaj multekostaj, sed se ni havus centran bankon, ĝi estus pli rapida kaj senpaga.

Multaj ciferecaj valutoj ne havas komunumon aŭ kialon por uzi ilin. Ili estas kvazaŭ solvoj serĉantaj problemojn. Esperantujo estas speciala, ĉar ni jam havas komunumon kaj jam havas kialon kaj bezonon por internacia mono. Oni povus facile informi milojn da homoj per blogoj, jutubaj filmetoj kaj gazetoj.

**Do mia ideo estas**, ke homoj povu ŝanĝi nacian valuton al la nova stelo ĉe la retejo de UEA aŭ TEJO. Per ĉi tiu mono, oni povus pagi kotizon al iu kongreso, abonon al revuo, aĉeti libron aŭ muzikon kaj tiel plu. En la kongreso oni povus aĉeti bieron aŭ ion alian en la vendejoj.

Tial preferindas, ke estu iu poŝtelefona apo, por facile sendi la monon. Aŭ eble se mi simple dirus mian kodon (kiel la UEA-konto), la vendisto povus aŭtomate elpreni la monon el mia konto (kompreneble estus kontroloj, por konfirmi tiujn elprenojn). Poste mi povus danki kaj subteni per donaco esperantistojn, kiuj verkas interesajn artikolojn. La valuto estus tute stabila kaj ĉiuj povus facile kaj senpage sendi monon.

Bedaŭrinde mi scias tute nenion pri programado aŭ la teknikaĵoj de ciferecaj valutoj. Mi petas, ke programistoj kontaktu min, por diskuti la eblecon de mia ideo. Kiuj estas eblaj problemoj, kostoj, teknikaĵoj? Mi volis nur doni kelkajn proponojn el financa kaj ekonomia vidpunktoj. Ĉu ĉi tiu estas bona ideo? Ĉu indas krei nian propran valuton? Ĉu mi proponis bonan sistemon por la valuto? Eble ĉi tiuj estas frenezaj neatingeblaj ideoj, sed ĉiuj novaj inventoj unue nur estis frenezaj ideoj, ĉu ne?

Robert Nielsen (rapn21@hotmail.com)

Fonto: “Libera Folio”, 3.3. 2018 ( Unue aperis ĉe “Teo kaj libroj”).Kun permeso de la aŭtoro, kiun ni kore dankas!

# EL LA GAZETARO

## Submara arĥeologio kaj numismatiko



Trezorĉasisto Alex Storm (1937-2018) navigis sur la oceanoj, por serĉi aventurojn kaj trezorojn. En 1965 fine okazis la granda evento: la malkovro de la vrako de “Chameau”, iama franca militista trimasta velŝipo, 40 metrojn longa, kiu velis kun 44 kanonoj, pasaĝeroj, varoj kaj fondusoj de Francio al la franca kolonio en Nord-ameriko.

La ŝipo pereis en 1725 en ŝtormego, frakasita kontraŭ rifo antaŭ la marbordo de Nova Skotio. Storm studis la historion de la ŝipo kaj eksciis, ke ĝi ekpedis i.a. 80.000 pundojn en oraj kaj arĝentaj moneroj.

Dum la somero de la jaro 1961 subakviĝante li trovis faskon de rustaj kanonoj. Pli interese estis la trovo de arĝenta kvar-punda monero kun la jarindiko 1724 kaj portreto de la reĝo Ludoviko 15a. Li petis kaj ricevis licencon de la registaro de Nova Skotio, por serĉi trezorojn. Tiel li ricevis ankaŭ la ekskluzivan rajton serĉi la vrakon kaj iĝi la posedanto de la trovitaĵoj. Per primitivaj iloj ili markis la esplorendan areon. Post multaj jaroj de studado, la sukceso venis en 1965. Storm trovis la trezoron en fendego de la t.n. “Kameloroko”: preskaŭ 4000 arĝentajn monerojn, 500 “Louis d’or”-monerojn kaj diversajn perditajn gemojn. La 500 luidoroj vere estis surprizo, ĉar en la dokumentoj ili ne estas menciitaj! En 1971 en aŭkcio 688 moneroj liveris 200 000 dolarojn...



Sinjoro Storm ne ĉesis serĉi trezorojn kaj pri liaj aventuroj li eldonis du librojn: en 1968 “Canada’s Treasure Hunt” (Kanada Trezorĉasado) kaj en 2003 “Algo kaj oro”.

En tiu lasta jaro en intervjuo li deklaris; “Mi lernis, ke trezorĉasado kaŭzas multe da laboro kaj cerbumado. Mia serĉado estis por mi nur hobbio, ŝatokupo. Mi tute ne serĉas oron aŭ arĝenton. Plaĉas al mi la aventuro, la trovo de trezoro mem, la rikolto kaj la aspekto de artefaktoj.

Fontoj:

- “Zeno”, aldoniĝo de la belga gazeto “De Morgen”, de sabato la 1an de septembro 2018
- “The New York Times”, la 24an de aŭgusto 2018

# **RETPOŜTO**

de vi por ni!

## **Reagoj kaj konversacioj**

16.01.2020 20:57

*Kara Jozefo!*

*Kiam mi sukcesas finprepari novan numeron de la ENA-revuo, mi kutime tuj sentas iom da senpezigo.*

*Aliflanke min sufiĉe ĝenas, ke mi devas rabi parton de via libertempo, por peti provlegadon. Tamen, mi esperas, ke vi ankoraŭ multajn jarojn volus kaj povus tiel helpi min, ĉar via tasko estas vere grava por la kvalito de nia revuo kaj la reputacio de ENA. Nu, bonvolu ne heziti peti mian helpon, se mi iel povus esti je via servo.*

*Do, mi denove tutkore antaŭdankas vin. Ne urĝas, do mi plejeble pacience atentos ĝis vi resendos la tekstojn.*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

21.01.2020 9:07

Kara Bert,

volonte mi staras je via dispono kaj tiu de "nia" revuo, ĝis mia sano permesos, vi kaj ĝi ja plenumas pioniran kaj gravan rolon en la informado de numismatoj kaj ankaŭ nenumismatoj kaj en la faka agado.

Permesu al mi rimarkon: en la artikolo pri The Agressor Language estas menciite, ke la ege amata frato de Zamenhof (temas verŝajne pri Aleksandr) mortigis sin. Nu, mi scias pri li, ke li estis kolonelo- kuracisto dum la unua mondmilito en la rusa armeo kaj mortigita en 1916, sed pri lia sinmortigo mi nun aŭdas la unuan fojon. Ĉu la fonto estas certa?

Pluan progreson al via agado!

Amike: Jozefo

### Reĝustigo pri la enhavo!

La 21an de januaro 2020 nia provleganto Jozefo Horvath atentigis nin pri misinformo en la teksto "The Agressor Language"; "... en la artikolo (...) estas menciite, ke la ege amata frato de Zamenhof (temas verŝajne pri Aleksandr) mortigis sin. Nu, mi scias pri li, ke li estis

*kolonelo-kuracisto dum la unua mondmilito en la rusa armeo kaj mortigita en 1916, sed pri lia sinmortigo mi nun aŭdas la unuan fojon. Ĉu la fonto estas certa?"*

Dankon pro la rimarko, Jozefo. Nia teksto estas traduko de anglalingva teksto de usona lingvistino Arika Okrent . La artikolo aperis en la revuo "The week", **sen fontoj**. Mi mem dubis pri la historia valoro de anekdoto en la sama artikolo pri germana esperantista soldato, kiu estus postlasinta apud iama arnhema esperantista kunvenejo surpaperan mesaĝon, por informi nederlandajn samideanojn, ke estas sendanĝere eniri la domon senhoman. Mi intencas korespondi kun la aŭtorino!



21.10.2019 18:04

*Kara Heidi!*

*Antaŭ nelonge la Banco de Cabinda emisiis du esperantotemajn neoficialajn "monerojn", kiujn mi dume povis aldoni al mia kolekto. Tamen mankas al mi informoj, por povi sufiĉe komplete priskribi ilin en la revuo de ENA. Nepe mi bezonas scii, kio estis la evento, kiu kaŭzis tiun eldonon (ĉu viaj surlokaj projektoj?). Krome kiom da ekzempleroj estas emisiitaj de ambaŭ moneroj kaj fine la nomon de la gravuristo-medalisto (+ eventuale koncizan biografion).*

*Klarige: en 2014 post malfondo de "La Hirundo" en Tienen, mi fondis unuafaje en la historio de Esperanto fakgrupon, kiu intencas priskribi kaj studi per scienca metodo historiajn objektojn, kiuj efike ilustras kaj pliriĉigas la historion de nia movado. Aldone mi tiurilate sendas al vi la novan numeron de nia revuo (jarkolekto 6, n-ro 4), por doni al vi ideon pri ĝi. Bonvolu legi nepe la lastan paĝon! Dankon!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*



22.10.2019 13:28

Saluton Miguel

bv. vidi la suban mesaĝon, certe vi scias pli pri tio ol mi, kiu scias pri tio nenion...

mi estas kun tre malmulte da kredo por la interreto, do ne plusendas la aldonitan revuon.

Bert, eble vi povas sendi rekte al Miguel

mi estas nun en Kabindo kaj la reto malbone funkcias, kaj multekostas.

salute al ambaŭ

Heidi

27.10.2019 16:35

Saluton Bert

mi havis vere malmultege da retaliro kiam mi legis vian mesaĝon, kaj nur nun, jam en Luanda, mi pli bone legis ĝin kaj komprenis ke temas pri Kabindo, ne pri Angolo. Mi sendas la mesaĝon ankaŭ al Miguel, kiu nur al mi respondis, ke li ne scias pri la afero, por ke li informiĝu pri mia respondo.

Tiu 'Banco de Cabindo' estas plej supozeble parto de tio kion la sendependistoj/nacionalistoj volas. Kabindo volas esti sendependa de Angola kaj havas registaron en ekzilo.

Vidu [https://en.wikipedia.org/wiki/Republic\\_of\\_Cabinda](https://en.wikipedia.org/wiki/Republic_of_Cabinda)

La fakto ke estas Esperanto sur la moneroj kiujn vi sendis, supozeble estas ligita al La Civito, kiu havis (ĉu havas?) rektan rilaton kun tiu registaro en ekzilo.

Vidu <http://www.esperantio.net/index.php?id=1462>

<http://www.esperantio.net/index.php?id=1435>

<http://www.esperantio.net/index.php?id=2198>

<http://www.esperantio.net/index.php?id=1877>

<http://www.esperantio.net/index.php?id=1551>

Fakte tiu ligilo estas la sola kiun mi povas pripensi.

Do, eble petu informojn de La Civito (vi povas sendi la ligilojn, aŭ aludi al ili, kaj se necese al mi sed bv. ne simple plusendu mian mesaĝon, mi ja ne scias sufiĉe pri la afero).

Iel ajn, ne-oficialaj moneroj, supozeble faritaj de ĉinoj, eble pro kunlaboro kun La Civito...

Esperable mi iom helpis

Amike,

Heidi

27.10.2019 16:37

Mi serĉis iom pli en la reto, jen la rezulto

<https://en.numista.com/catalogue/pieces180224.html>

<https://en.numista.com/catalogue/pieces180223.html>

Heidi

27.10.2019 20:09

*Kara Heidi!*

*Multan, multan dankon pro viaj serĉado kaj interesaj rezultoj. Ekde nun mi povos iri laŭ diversaj vojoj.*

*Mi jam deziras al vi sukcesojn koncerne vian pioniran projekton en Kabinda, se mi estas bone informita pri la loko.*

*Preta por reciproka helpo, sed kiel mi provizore ne scias, do...*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*



24.10.2019 11:16

Kara Bert!

Mi kunsendas La Bulteneton 45 (provizora versio) kun mencio de ENA sur paĝo 15.

Ĉu en ordo?

Salutas Walter

24.10.2019 20:13

*Kara Walter!*

*Dum la lasta semajno mia komputilo estis kaduka pro virusa atako, sed nun denove kiel nova, almenaŭ laŭ la komercisto.*

*Multan dankon pro la freŝa Bulteneto, kiu aspektas alloga pro la multkoloraj bildoj kaj pro la efikaj komentoj. Specialan dankon pro la publikigo de la ENA-varbilo!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

22.01.2020 21:42

Kara Bert!

Dankon. Mia printilo laboras jam.

La 28an de januaro 2020 mi subskribos la kontrakton por la produktado de la 50 steloj en Münze Österreich, Am Heumarkt 1.

Salutas Walter





16.10.2019 22:02

*Kara amikino!*

*Al nia ENA-fakgrupo hieraŭ aliĝis junulino el Koreio kiu trovis informojn pri ENA en "Juna Amiko"! Multan dankon pro via kunlaboro. Kion mi reciproke povas fari por helpi vin koncerne ILEI aŭ Juna Amiko?*

*Amike kaj numismate,*

*Mag. Fil. Bert Boon*

*Iniciatoro de Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)*

*Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"*

*Fakdelegito pri numismatiko*

26.10.2019 22:11

Kara Bert,

mi ĝojas pri tiu novaĵo! Ĝi signifas, ke JA plenumas sian rolon kiel anoncanto/ propagandisto pri Esperanto kaj poiome aperas ankaŭ en Azio (mi aŭdis de koreanoj, ke malmultaj legas Jan en Azio).

Sekve, la nunaj malfacilaĵoj pri la revuo havas ŝancon malaperi finfine.

Vi reciprokos, se reklamos laŭeble pri ILEI kaj Juna amiko por ke ili havu pli da membroj/abonantoj. Tamen tio, certe, ne estas deviga. ☐

Ja ni ĉiuj estas volontuloj rilate al Esperanto. Same mi ŝatas Esperanton kaj laboras por ĝi, kiel permesas tempo, tute ne atendante iun rekompencan pri tio.

Amike, Elena Nadikova, estrarano de ILEI - Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj



28.10.2019 10:46

*Kara Garry!*

*Mia komputilo denove funkcias, do nun mi sendas al vi **korekt- kaj kompletigcele** la provizoran tekston kiun mi intencas dissendi reklamcele al la ENA-membroj, plejeble multaj revuoj (se vi havas retadresojn...!) kaj al la landaj Esperanto-asocioj tutmondaj.*

*Eble necesus aldoni al via teksto vian UEA-konton, ĉu?*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

29.10.2019 13:14

Kara Bert,

Mi tre dankas vin pro via klopodoj reklami la medalon por la venonta UK. Mi nur petas al vi aldoni unu aferon al via teksto. Mi preferus, ke vi aldonu “probablan” aŭ “proponatan” al la frazeto “anoncas al vi la baldaŭan eldonon...”. La presado de medalo okazas, nur se sufiĉe da homoj mendos ĝin antaŭe.

Amike,

Garry



24.11.2019 9:59

Estimata Bert Boon!

Mi sendas al Vi la informon pri argila medalo.

### Biografio pri la artisto- gravuristo

Aleksandr Solomin naskiĝis la 4-an de julio 1941 en Moskvo, en la familio de maristo kaj inĝenierino.

En 1965 li finis Odesan Politeknikan Instituton.

Li estas posedanto de hela desegna kapo kaj oraj manoj. Estas la generatoro de ideoj, kreinto de Esperanta Pupteatro. La pupojn li persone produktis.

Li estas talenta direktoro de prezentadoj de odesaj esperantistoj en la baltaj ŝtatoj (Smolininkaj, Kose, Kaŭnas).

A.Solomin unue aŭdis pri Esperanto en novembro 1983. Li studentiĝis ĉe komencantaj kursoj kaj fariĝis membro de odesa Esperanto-klubo "Blanka Akacio".

La unua lia esperanto-instruisto estis Semen Vajnblat.

Dank 'al sia scio pri Esperanto, A.Solomin partoprenis diversajn internaciajn eventojn.

Li vizitis multajn landojn: Rusion, Armenion, Latvion, Litovion, Estonion, Kazakstanon, Uzbekion, Moldavion, Belorusion, Tatarstanon, Baŝkirostanon, Israelon, Kubon, Pollandon, Germanion, Hungarion, Andoron.

A.Solomin loĝas en Ukrainio, en Odeso.

Li kreis ĉi-tiun argilan medalon okaze de la 200-jariĝo de la naskiĝo de la urbo Odessa, en 1994 jaro.

Jen la informoj pri la argila medalo:

Diametro -71 mm

Produkta kosto -100 eŭro

Pezo -29 gramoj

Prezo -800 eŭro

Dikeco -6.5 mm

Poŝtaj elspezoj-50 eŭro

Amike. Tamara Popova.



12.01.2020 12:13

*Kara Aldis!*

*Mi bezonas vian helpon. Sur la medalo sube estas vorto kiun mi ne komprenas. Ĝi estas super la nomo R. Libeks. Ĉu estas "Sastahdijis"? Kaj kio estas la traduko en Esperanto?*

*Mi kore antaŭdankas vin kaj salutas*

*Amike kaj numismate*

*Bert Boon por ENA*



12.01.2020 14:08

Saluton !

Vi estas bravulo ! Tute ĝuste Vi tralegis tiun vorton. Ĝi estas skribita en gotika stilo. Pasis jam preskaŭ cent jaroj de kiam Latvio komencis uzis nunan skribmanieron. Ĉirkaŭ 10 – 20 jarojn ambaŭ estis uzataj preskaŭ paralele. Mi memoras, ke estante 10 -12 jaraĝa mi hejme trovis kelkajn librojn gotike kaj preskaŭ memstare ekposedis ilin tralegi.

Nun la vorton oni skribas "Sastādījīs" - ĝi signifas "kompilis". Mi ĝojas helpi Vin.

Sukcesan Novan 2020 - jaron.

Amike Aldis



27.01.2020 17:44

Kara Bert!

Mi ne povas min deteni, sendi al vi entuziasman gratulon pro via lasta kreitaĵo! Mi altadmire envias vian verkokapablon, vian esloremon, vian historian kompetentecon: mi fieregas, ke vi estas grava parto de nia filatelista teamo, ĉar via alporto al farado de LVL estas ege valora kaj ke danke al vi ni filatelistoj ricevos pluajn aliĝojn! Mi kredas, ke fakrevuo, kia la via estas, neniam ajn ekzistis en la tuta E-movada historio. Mi nur trafolumis ĝin, ĉar mi ĝin presos por pli bone ĝui vian interesegegan surpaperan verkaĵon. Eventualaj komentoj aŭ pli detalaj informpetoj atingos vin iom pli poste.

Elkore, Elda

29.01.2020 15:05

*Kara Elda!*

*Kiel kutime vi troiĝetas laŭdante la rezultojn de mia laboro por ENA, sed ĉar mi scias, ke vi estas tute sincera, mi dankege akceptas viajn pozitivajn vortojn kiel instigon al daŭrigo!*

*Se mi vere estus sufiĉe valora kiel kunlaboranta redaktoro de “La Verda Lupeo”, jen alia instigo! Neniam ni sukcesus anstataŭigi nian karmemoran Rudy, sed kiel “musketeroj” nia trio estos sufiĉe forta por varbi novajn filatelistojn per deloga altkvalita revuo, la plej taŭga elpendaĵo, laŭ mi.*

*Amike, filatele kaj numismate,*

*Bert*



27.01.2020 21:25

Kara Bert,

Via alsendo de la revuo de la 22/01/2020 senprobleme atingis min kaj estis alirebla.

Mi fakte volas gratuli vin pro la ampleksa kaj interesa revuo. Vi scias, ke mi ne havas multe da tempo sed mi devas konfesi ke mi tamen legis diversajn artikolojn el kiuj la “Historiaj Aspektoj” kaj ankaŭ la Lingvaj konsiloj el la “Retpoŝto” tre interesis min sed ne nur tiuj ankaŭ aliaj.

Amike,

Katja



27.01.2020 16:57

*Kara Ela!*

*Unue multan dankon pro via reago! Ne estis facile kontakti vin, sed fine sukcesis.*

*Kion vi povus fari por mi? Permesu, ke mi plejeble koncize klarigas la kialon de mia propono al la “Esperanta-Libraro” de Bjalistoko.*

*Antaŭ nur ses jaroj mi lanĉis la iniciativon unuafoje en la historio de nia Esperanto-kulturo fondi fakan organizon pri esperanta numismatiko, niĉo preskaŭ tute malplena. Tiurilate estis kaj estas perrete sendata la revuo “Esperanta Numismatiko” kiel organo de Esperanto-Numismatika Asocio TUTE SENPAGE al ĉiuj gesamideanoj kiuj sendas retmesaĝon “Mi volas aliĝi”. Lastan jaron ne malpli ol 30 tiajn petojn ni ricevis, tiel ke la nombro de individuaj membroj-abonantoj kreskis ĝis 138 personoj el 42 landoj. Krome aliĝis 21 asocioj*

*esperantaj kaj neesperantaj el 14 landoj, i.a. diversaj esperantaj muzeoj kaj bibliotekoj kaj eĉ la Fakultato pri Numismatiko de la Universitato en Vieno.*

*Ni do proponas al via libraro aliĝi kiel 22a asocia membro. La rubriko "Moneroj & medaloj" estos la bazo de baldaŭ kompilenda katalogo, sed ni ankaŭ planas kompili numismatikan terminaron esperantan.*

*Amike kaj numismate,*

*Mag.fil. Bert Boon*

*Iniciatinto de ENA*

*Finredaktoro de "Esperanta Numismatiko"*

*Fakdelegito pri esperanta numismatiko*

28.01.2020 15:21

Kara Bert

nome de la "Esperanto-Libraro" kaj ĝiaj legantoj mi respondas "Mi volas aliĝi".

Krome tio mi sendis la tradukitan tekston de via propono al la paĝo de bjalistokaj kolektantoj - eble iu el ili skribos al vi.

kun bondeziroj

Ela Karczewska (bibliotekistino)



29.01.2020 9:02

Estimata samideano Boon,

Mi volas konfirmi, ke nia Dokumenta Esperanto-Centro (DEC), la nacia Esperanto-arkivo en Kroatio, regule ricevas vian bultenon "Esperanta numismatiko". Ni konsideras ĝin valora helpilo por esplorado de numismatikaĵoj eldonitaj de esperantistoj. Pro tio ni printis ĉiujn ĝisnunajn numerojn kaj konservis ilin en nia arkivo en la papera kaj diĝita formoj por homoj, kiuj volos konsulti ilin.

Dezirante al vi sukcesan laboron, amike salutas Josip Pleadin, sekretario de DEC

29.01.2020 14:40

*Estimata sinjoro Pleadin!*

*Kun ĝojo mi (re)legis vian mesaĝon pri via iniciativo disponigi per via Dokumenta Esperanto-Centro la ENA-revuon al (esperantaj) geinteresuloj kaj mi kore dankas vin en la nomo de la kunlaborantaj redaktoroj, kiuj kune kontribuas al la fina rezulto de ĉiu numero. La DEC do estas grava faktoro en la konservo kaj disvastigo de la kono pri iam forgesita aspekto de la esperanta kulturo!*

*Krome ni dankas vin pro viaj bondeziroj koncerne nian laboron, kio ege instigas nin daŭrigi la laboradon al altnivela celo.*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*



01.02.2020 13:43

Kara Bert,

pardonu, ke la afero daŭris iomete!

La medalon ricevis la Esperanto-Grupo Aalen kune kun koncerna honorigo jam antaŭ 26 jaroj.

Bedaŭrinde nuntempe tute ne klaris, kie la medalo kuŝas. Oni povus ja supozi, ke la plej taŭga loko estus la biblioteko en Aalen.

Sed laŭ la katalogo ne estas trovebla iu ajn indiko.

Mi tamen provis trovi ĝin tie, sed: ne estas facile, simple iri al la bretaro kaj aŭtopsie trarigardi ĉion, ĉar temas pri pli ol 1 ejo kaj multegaj metroj da sinsekvaj metro de bretoj.

Fine mi ne trovis ion ajn. Nu, min ne mirigas tio, ĉar esence la biblioteka tasko celas kolekti kaj konservi librojn kaj paperajn eldonojn de periodaĵoj. Intertempe eĉ minacas la elĉerpiĝo de spaco disponebla, kvankam jam aldoniĝis plua biblioteka salono.

Tial mi nun volonte celas, ankaŭ kolekti la nepaperajn eldonojn de periodaĵoj, kiel faras la via revuo.

Intertempe nia (tiama kaj nuna) grupestro serĉis hejme kaj fine sukcesis ...

Jen la detaloj, kiujn ni kiel ne-numismatoj povas prijuĝi:

Temas pri medalo, kiun ĝenerale priskribas la jena retejo:

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Meritmedalo\\_de\\_GEA](https://eo.wikipedia.org/wiki/Meritmedalo_de_GEA)

Ĉiu el ili (9 konataj ekzempleroj) estas unikaĵo, ĉar estas engravurita la nomo de la distingito(j).

La materialon ni ne konas (kiel nefakuloj ankaŭ ne povas kalkuli tion el la grandeco kaj pezo).

Ĉiukaze la surfaco estas polurita kaj arĝentumita (pro kio estas malfacila tasko, fari bonan foton). diametro: 40 mm pezo: 2,6 g

aldone fotoj!

Amike kaj numismate-nefakule salutas,

Utho

01.02.2020 17:01

*Kara Utho!*

*Mi ne scias kiel sufiĉe kaj dece danki vin pro via laborado kaj serĉado por elfosi informojn pri la meritmedalo de GEA en la "labirinto" de la biblioteko de Aalen. Informoj kiuj por ENA estas ege taŭgaj kaj multvaloraj sur la vojo al la kompilado de la unua Katalogo de Esperanta Numismatiko.*

*Ankaŭ la fotoj estas altkvalitaj. Pro ili mi volas elkore danki la grupestron de Aalen. Se li ŝatus ricevi persone la numeron pri la medalo, kiu aperos fine de aprilo, bonvolu havigi al mi lian retadreson.*

*Se iam mi reciproke povus esti je via servo aŭ je tiu de la biblioteko, ne hezitu peti mian helpon aŭ kunlaboron.*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*



09.02.2020 22:14

Kara Bert,

Ĉu vi havis la okazon ion kompili por la retejo de ELF-AREK rilate al Numismatiko. Kompreneble ni tie reliefigas la partnerecon kun ENA kaj havas ligilon al viaj paĝoj.

La retejo ĉi-momente spertas teĥnikan riparon.

Elda kaj mi volas lanĉi ĝin kiel eble plej baldaŭ (UEA verŝajne kunlaboros pri la diskonigo), sed ni ne volis tion fari sen la numismatika rubriko kun teksto kaj bildoj.  
Amike dankas

James

09.02.2020 22:26

*Saluton, James!*

*Vere bona iniciativo. Dankon! Ankaŭ koncerne la okazon aliel diskonigi ENA-n.*

*Mi intencas serioze prepari kaj prilabori la aferon. Do, kiom da tempo mi havos kaj kiel longa estu mia kontribuado?*

*Ĝis baldaŭ!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*



17.02.2020 17:44

*Estimata Sinjoro Jegorovas, kara ENA-membro Povilas!*

*Antaŭu nelonge mi trovis informilon, kiu koncize mencias, ke en la pasinteco en via lando estis veterana esperantisto, nome iu Gintaras Ziaunys, fama pro lia riĉa kolekto pri esperantaj moneroj kaj medaloj. Estus tre interese por nia revuo trovi pli fundamentajn informojn pri li. Mi mem jam serĉis per Google, sed trovis nenion. Ĉu vi povus iom serĉi, eble en arkivoj de via landa movado?*

*Mi tutkore dankas vin anticipe,*

*Amike kaj numismate,*

*Mag.Fil. Bert Boon*

18.02.2020 10:09

Bonan tagon,

Gintaras ŽIAUNYS ne estas tiom veterano. Li estas proksimume 70-jara, eble iom malpli. Li estas bona esperantisto, sed neniam aktivis en la Esperanto-movado. Tamen li estas profesia kolektanto. Lia retadreso estas... Bonvolu kontakti lin rekte.

Amike,

Povilas JEGOROVAS



15.03.2020 17:56

*Kara civitanino, kara S-rino Martinelli*

*Dankon pro via respondo. Mi pardonpetas pro la prokrasto de la mia.*

*Mi tre bedaŭras la forpason de civitano Trifonĉovski, kun kiu mi iam korespondis pri mia unua monografio por LF.*

*Koncerne la anoncitan jubilean medalon de nia Civito, mi volonte kunlaboros, kiel mi jam faris por la UK-medalo de Seulo, la memormedalo pri De Saussure far Walter Klag kaj pli aktuale la UK-medalo de la UK en Montrealo en 2020. Tial mi kunsendos liston kun konsiloj, kiu estas sendata al helpopetantoj.*

*Mi supozas, ke vi nuntempe havas problemon trovi desegniston en via regiono. Se necese, mi povus kontakti en Belgio renomman artiston-medaliston, nome Paul Huybrechts, kiu i.a. kreis esperantajn memormedalojn por la iama grupo kies prezidanto mi estis dum 25 jaroj.*



*Problemo povus esti, ke li ne estas esperantisto, nur mastras la francan kaj la anglan. Gravas tamen, ke vi rekte kontaktu lin por intertrakti pri aspekto, eldonkvanto, mezuroj, pezo, prezo kaj sendokostoj. Se vi akceptus min kiel peranton, mi povus unuavice demandi al li en kiu lingvo li volas interparoli kun vi por trovi akordon, sekve havigi al vi lian retadreson.*

*PS. Multan dankon, ke vi bonvenigos por LF mian verkendan monografion pri la "Lima-  
letero" de Zamenhof!*

*Altestime kaj numismate,*

*Bert*

15.03.2020 18:07

Kara civitano,

Dankon pro la detala respondo. Mi reskribos post deko da tagoj, ĉar nun mi estas forvojaĝonta al la Parlamenta sesio en Budapeŝto, kaj mi bezonas antaŭe viziti oficejojn por havi la permeson flugi: abrupte ĉio estas blokita en Hispanio, kvankam ĉi tie estas absolute neniu kazo de Kronviruso. Nu, la burokratio. Ĉiel, mi povas jam diri ke ne estos lingva problemo pro eventuala interŝanĝo kun s-ro Huybrechts: mi preferas la francan sed eblas ankaŭ la angla.

Amike,

Perla



20.03.2020 9:26

Saluton Bert,

Mi ankoraŭ foje trarigardis la kolektojn de via revuo kaj estas mirigita pro la kvalito de la informoj, profesionaleco kaj diversfontoj uzitaj.

Skrupuloza laboro estas. Dankon.

Mi sendas al vi ambaŭflankajn fotojn de la koncerna E-medalo, esperante ke ĝi utilis por interesantoj.

Samtempe, trarigardante miajn arkivojn, mi malkovris kelkajn duoblaĵojn.

Se ili trovos interesantojn mi pretas plezure trakti la dividon.

Dankon.

Amike,

Evgen

Saluton Eŭgeno,

Mi tre ĝojas pro la sendo de la altkvalitaj fotoj. Dankon!

Viaj pozitivaj impresoj pri la revuo estas por mi plia instigo al daŭrigo de mia laborado: revuo agrabla por la okuloj, science plejeble akurata por la menso.

Parolante pri duoblaĵoj vi scivolemigis min, ĉar mi havas mem kolekton en kiu sufiĉe da specimenoj ankoraŭ mankas. Diversaj jam priskribitaj artefaktoj ja ne estas en mia kolekto. Do, se eble por vi, mi petas montri kelkajn duoblaĵojn kun via petota prezo.

Krome mi serĉas senĉese monerojn kaj medalojn por montri kaj priskribi en la revuo, ĉar baldaŭ mi komencos kompili la unuan katalogon pri esperanta numismatiko en la historio de Esperanto.

Mi ankaŭ esperas, ke Spomenka povos klarigi kiu estas la artisto-medalisto kiu havigis tiujn medalojn al vi dum la UK 72a. La miajn mi aĉetis antaŭ nelonge de heredanto de mia karmemora amiko Hans Jankowski, honora membro de ENA.

Kun amikaj salutoj,

Bert



## SPECIALA ANONCO!

### La vendoservo de FEL proponas:



Nun tre bona okazo por aĉeti la faman medalon laŭ iniciativo de Andreo Cseh kaj Julia Isbrücker kontraŭ **nur 58,00 eŭrojn** + sendokostoj. **Nur unu ekzemplero!**

Flandra Esperanto-Ligo: [butiko@fel.esperanto.be](mailto:butiko@fel.esperanto.be)

# ANONCOJ

&

# EVENTOJ

## Persona donaco de nia membro Walter Klag al aŭstria Muzeo



La 14an de januaro 2020 nia Walter Klag el Vieno donacis serion de stelo-moneroj (+ 5 + 10 + 100) en metalo kaj (+ 1 + 3 + 10) en plasto al la monerkolekto de Arthistoria Muzeo en Vieno, ĉefurbo de Aŭstrio (Münzkabinett des Kunsthistorischen Museums).

Laŭ Walter eventuale okazos tiurilata ekspozicio.

<https://www.khm.at/besuchen/sammlungen/muenzkabinett/>

*Ni kore gratulas Walter pro lia neordinara iniciativo favore al Esperanto kaj ĝia numismatiko!*



## En majo aperos nova arĝenta memormedalo de Walter Klag!



2020 estas la 100a datreveno de la 12a Universala Kongreso en Hago (1920). Julia Isbrücker kunorganizis ĝin.

La realigo de tiu kongreso pravas, ke ankaŭ granda milito ne povas neniigi nian lingvon.

- Julia Isbrücker kunfondis Internacian Esperanto-Instituton kaj Universalan Ligon kaj kuneldonis la metalajn stelo-monerojn, kies nominaloj estas 1, 5, 10 kaj 25 steloj.



En majo 2020 aperos arĝenta 50-stela moneroforma medalo por la honoro de Julia Isbrücker:

- Sur la monero Julia Isbrücker, desegnita 2020 de mag. Helmut Andexlinger (monogramo A. H.), la ĉefdezajnisto de Münze Österreich.

Maso 30 gramoj da arĝento 925/1000, diametro 40 mm, eldonkvanto 300.

Surfaco: Polur (PP, prooflike). Punze = arĝentostampo 925.-

Produktota de Münze Österreich (Monerfarejo Aŭstria) en Vieno, tio estas 100%a filia kompanio de Aŭstria Nacia Banko.

Prezo 60 € inkluzive de la sendokostoj (validas por eŭro-landoj). **Sendado post antaŭpago.**

### Bonvolu sendi al mi tekstojn kaj fotojn de kaj pri Julia.

La kolektita materialo aperos kaj en la formo de vikipediaj artikoloj en diversaj lingvoj kaj kiel broŝuro.

En la fina eldonaĵo via nomo estos menciita.

Walter Klag, [esperanto@chello.at](mailto:esperanto@chello.at).

## *Varbilo por ENA!*

**Karaj membroj!**

**Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!**

**Bert**

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol ses jaroj ĝis 140 individuaj membroj kaj 22 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la *NUR PERRETA* revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŭti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA 2018 sur pp. 66-67. Se vi dezirus pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: [bert.boon@skynet.be](mailto:bert.boon@skynet.be)!

**Vi krome rajtas unue peti provnumeron!**

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”